


LA JUNNA VIVO



MONATA ORGANO DE „TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO”

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.
 ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 1,50 NED. GULDENO AŬ EGALVALORO.

Por progresintoj.

PARTO EL LETERO AL LORDO BEVERIDGE.

Dum sia vizito al Germanujo la konata brita politikisto Lordo Beveridge ricevis leteron de malnova amiko, kiun li parte presigis en „The Spectator”.

..... „Ankoraŭ io, kion mi ne rakontis al vi, kiam vi estis ĉi tie. Mi perdis mian familion: miajn amatan edzinon kaj tri karajn infanojn, pro britaj bomboj sur Dresden. Mi eĉ ne scias, kiel ili mortis, ĉu ili cindriĝis aŭ enteriĝis. Lastfoje oni vidis ilin en la Centra Stacidomo en Dresden, dum la granda aeroplanatako. Poste ili malaperis en la haoso: neniuj iom scias pri ili. Mi tiam estis en la armeo. Kaj tamen: mi ne povas kaj ne volas malami: Ja estas sufiĉe da malamo en la mondo.

Mia vivo estas detruita. Se havos iun sencon vivi plu, nur estos por helpi malebligi ke triafoje okazos tiom terura homa eraro, kia estis ĉi tiu milito. Per ĉiu energio, kiu restis en mi, mi edukos miajn studentojn al tiu celo. Rakontu tion en Britujo, se oni tion deziras, donu mian adreson al tiuj, kiuj travivis saman sperton, kaj ankoraŭ ne trovis la vojon returne el ĉagreno kaj malamo.

Mi bone konas Anglujon. Mi studis en Londono kaj Cambridge. Plurfoje mi vizitis Londonon, Oxford kaj Cambridge, sola aŭ kun la Internacia Studento-Servo (I.S.S.). Ĝisoste mi estis Brite-

ma. Ĝis tiu ĉi okazintaĵo absolute renversis min. Mi ne povas forgesi ke ne estis milita neceso por tiu atako je Dresden, kaj ke precipe estis mortigataj virinoj kaj infanoj, multaj miloj. Sed mi devos forgesi. Miaj amataj mortintoj atendas de mi ne malamon kaj venĝon kaj ĉikanadon, sed nur amon kaj laboron por pli bona mondo. Kiel sensece estus ilia ofero se ne ĉi tio estus la sekvo.

Ĝis nun mi ne klopodis ree interkontaktiĝi kun iu ajn ĉe vi, eĉ ne kun miaj antaŭaj amikoj. Mi atendis voĉon de homa amo kaj komprenemo, kaj plej interne mi sciis — tion britema mi ankoraŭ estis — ke tiu baldaŭ venos, kaj tion mi ankaŭ diris al miaj lernantoj. Nun via vizito reportis la sferon de miaj feliĉaj tagoj en Londono kaj Cambridge. Baldaŭ mi ree skribos ankaŭ al aliaj malnovaj amikoj, por religi la rilatojn.

Ĉi tion mi volis skribi al vi, por montri kiajn sekvojn, — pure privatajn — havis via vizito. Se vi bezonas iun, kiu ĉi tie volas labori por la alta idealo kiun vi aspiras, pri paco kaj pli bona interkompreniĝo inter ambaŭ niaj popoloj, precipe ankaŭ inter la akademianoj, mi ĉiam estas je via dispono. Eble mi, pro mia scio pri Britujo kaj mia doloriga Vivosperto, tre taŭgas por tia laboro.”

„La Vekiĝo”, grupo de junaj portugalaĵoj, donacis sian himnon al TJO, pro kio ni tre dankas ilin! Bedaŭrinde ni pro manko de mono momente ne povas fariĝi kliŝo de la muziko. Tuj kiam eblos ni tamen donos la muziknotojn. Jen jam la vortoj:

„LA VEKIĜO”.

Firmaj estu ni, ho fratoj
Kaj fidelaj en fervoro
Malgraŭ multaj sortobatoj
Malgraŭ faloj ĉe l' laboro.

Multaj baroj elstariĝos
Sur la vojo nia certe.
Sed en polvon ja fariĝos
Se persistos ni koncerte.

Novan senton ni konigas,
Al la mondo en sufero.
Ĝia varmo jam lumigas
Helan flamon de l' espero.

Ni semadu inspirataj
Grajnajn nur de ampromeso,
Kaj la semoj disjetitaj
Disflorados en progreso.

Glorajn fruktojn fine havos
Niaj penoj kun prestiĝo;
Ni la mondon tiel savos,
Ĝin preparas al vekigo.

Firmaj estu, do, ho fratoj
Kaj fidelaj en fervoro
Malgraŭ multaj sortobatoj
Malgraŭ faloj ĉe l' laboro.

Barreiro, 9-10-'46.

Luso Bemaldo.

KARAJ GEAMIKOJ.

Ĉi tiu modesta skribaĵo estas la unua de serio kiun mi intencas verki por iomete informi vin pri la vivo kaj tipaĵoj de Hispanujo. Mi ekhavis ĉi tiun ideon, konstatanta la eraran opinion kiun oni havas eksterlande pri tiu ĉi lando.

Pere de kelkaj leteroj de fremdaj geamikoj mi konstatas ke multaj alilandanoj ankoraŭ opinias Hispanujon tia, kia ĝi estis antaŭ multaj jaroj, kun banditoj, procesioj, toreadoroj

En Esperanto-gazeto mi trovis artikolon eltiritan el la libro „Mañana” de la dana verkisto Hans Andreasen, kiu rakontas pri hispanaj moroj sur la Kanariaj Insuloj. Ĉi tiu artikolo igis min rideti, ĉar la absurdaĵoj estas nenombreblaj.

Kaj ĉi tiuj estas la kialoj, kiuj igas min skribi iom pri Hispanujo: kontraŭstari kiel eble plej bone tiajn asertojn kaj konigi al vi ĉi tiun belan, sunplenan landon.

Mi komencas tiun taskon rakontante iom pri la geografia formo: Hispanujo situas en la ekstrema sud-okcidento de Eŭropo, ĝi estas la rando de l' mondo, la antikva kaj mezepoka „finis terrae”. Ĝi estas duoninsulo, kiu similas al sternita bova haŭto. Kiel en la klasika mito, la kunligo de Hispanujo al Eŭropo ĉiam estas frukto de perforteco, ĉar feliĉe aŭ malfeliĉe, tiu lando havas multajn ne-eŭropajn trajtojn.

La maro, kiu preskaŭ ĉirkaŭas kaj izolas ĝin, malfermas sen-nombrajn vojojn al invadoj.

La Ibéra Duoninsulo (geografie, historie kaj arte parolante estas absurdaĵo forlasi Portugalujon) havas 580983 kvadratajn kilometrojn, el kiuj proksimume 261400 havas malsekan klimaton. Sekvo de tio estas neatenditaj ŝanĝoj en la kreskajaro. Ĉar troviĝas en la sama lando lokoj kie ofte pluvas (la tuta nordo kaj nord-okcidento) kaj lokoj kie ne pluvas dum la paso de kelkaj jaroj (kiel iuj de l' suba Aragón kaj de l' Sud-oriento).

Inter la norda arbaro (kverkoj, kaŝtanoj, fagoj, betuloj, avelarboj, tilioj, aceroj, pinoj) kaj la mediteranea arbaro (kverkoj, karobarboj, blankaj pinoj), inter la senfrukta stepo kaj la legomkampoj de Murcia kaj Valencia; inter la riĉaj valoj de Granada aŭ Plasencia kaj la olivarboj de Córdoba y Jaén; inter la palmaroj de Elche kaj la cipresoj de l' Generalife, inter la pinaroj de Segovia y Cuenci kaj la oranĝarbaroj de Valencia kaj Alicante, inter la maizkampoj de Galicia kaj la vinberuj-

kampoj de la Mancha, de la Rioja aŭ de Jerez, la fizionomio de la hispana pejzaĝo ŝanĝiĝas en mallongaj interspacoj. Juĝu, kaj pensu ĉu io povas havi pli grandan allogon por ŝanĝavidaj turistoj.

El Granada oni en mallonga tempo alvenas de inter „cármenes” (kamparaj restadejoj) kaj aroj de „pitas” (specoj de agavo aŭ aloo) kaj „hindaj figarboj” al la supro de l' Veleta kaj l' Muhacén, kun 3.481 metroj la plej alta monto de Hispanujo, al vilaĝoj „alpujarrenas” (vilaĝoj en la Alpujares, Andaluzio), preskaŭ la plej altaj de Eŭropo, kaj al la marbordo de Mòtril, riĉa sukerkana kaj kotona regiono, kie neniam frostas.

Oni bezonas malmultajn horojn por malsupreniri el la nuda Cebero (Lugo), kie la domoj havas rondan formon, kiel la prahistoriaj „citanias”, kaj kie oni nur kulturas sekalon, al la riveroj de la provinco de Pontevedra, riveroj, kies bordoj estas ĉiam verdaj, kie maturiĝas oranĝoj kaj citronoj, kie kreskadas palmoj kaj belegaj magnolioj kaj kamelioj, eĉ ne bezonante prizorgon.

Madrido kuŝas je 50-kilometra distanco de la montaro de Guadarrama, kun neĝo dum la someraj monatoj, kaj estas je sama distanco de Aranjuez, ĉiam florplena kaj de la senfina Mancha, preskaŭ dezerta. Tiu ĉi ekzemplo de grandaj ŝanĝiĝoj en mallongaj distancoj ripetiĝas multfoje. Tamen la plej rapidajn variojn oni konstatas malsuprenirante el la Meseta Castellana al la marbordo. La pasejoj de Pajares, el Manzanal, Reinoso, Depenaperros, el Chorro, ktp. estas vojpertoj en kiuj la vojaĝantoj trovas plej allogajn spektaklojn.

Abundas, plie, en la duoninsulo lokoj, kiujn oni povas nomi „balkonoj” aŭ „rigardejoj”, kie oni ĝuas mirindajn panoramojn: de la alta Samicira, apud Pontevedra, de la supro de l' monto Tecla, de Penas Luengas, de Navacerrada, de Igueldo..... se oni centoble plilongigus ĉi tiun liston, ĝi ankoraŭ ne estus kompleta.

La geologia strukturo produktis en Hispanujo mirindaĵojn kia la intermonto de Pancorbo, la „ensorĉita urbo” en Cuenca, la „torcal” (tereno kun montogorĝoj) de Antequera en Málaga, la „tabloj” de Villaverde, la kavoj de Arté en Mallorca, la „tranĉo” de Ronda.....

Se vojaĝanto ŝatas lagojn, Hispanujo montros al li novaĵojn. Mi nur citos Sanobira kaj Zamora, Mar Menor en Murcia kaj Lobos en Vigo.

Tia estas Hispanujo: montaro kaj ebenaĵo; krutegaj marbordoj

kaj belaj strandoj; stepoj kaj frukto-ĝardenoj; profundaj valoj kaj krutaj suprenirejoj; ĉiamverdaj valoj kaj grizaj ebenaĵoj; nudaj montoj kaj netraireblaj arbaroj; riveroj, kiuj dum tri monatoj estas torentoj kaj dum naŭ monatoj estas piedireblaj vojoj; aliaj, kun trankvila fluo kaj kvietaj bordoj, kiuj poste bruegante enabismigas inter rokoj; aliaj, finfine, forlasante ĉiujn regulojn, kiel la rivero Guadiana, malaperas subtere kaj reaperas post kelkaj kilometroj ankoraŭ pli grandaj.

Laŭ la maro alternas rokegoj kaj revantaj strandoj, kie akvo kaj tero ŝajne trovas plezuron en la longa kontakto malantaŭ ŝirmantaj insuloj, kiuj igas ilin sendanĝeraj kaj komfortaj.

Octavio Diego de la Rosa, Zaragoza, Hispanujo.

(Rimarko de la redakcio: Ni esperas, ke la klarigoj de la hispanaj vortoj estas ĝustaj. Ni tamen urĝe petas, ke la aŭtoroj mem klarigu nacilingvajn esprimojn!)

La mirinda vesperito.

La vesperito estas nokta besto, kiu ĉiam flugas en la mallumo. Ĉu ĝi do ne riskas kolizii kun arboj kaj konstruaĵoj? La vesperito tute ne povas vidi objektojn antaŭ si. Certe ĝi havas instinktan metodon por eviti danĝeron. Kaj vere, eksperimentoj antaŭ ne-longe pruvis, ke tiu stranga, eta besto eligas akrajn kriojn — kiuj ne estas aŭdeblaj por la homa orelo — kaj ĝi analizas la ĉojn, kiuj resonas de iu objekto. Tiu instinkta analizado ebligas al ili tuj scii kie staras objektoj, kaj tiel ili povas flugi en la plej densa mallumo sen akcidento!

La suprajn faktojn raportis d-roj Donald Griffin kaj Roberto Galambos de la Medicina Lernejo de Rochester, Usono. Kiam la scienculoj supozis, ke eble la vesperitoj eligas sonojn, ili faris diversajn eksperimentojn pere de speciala ilo, kiu ebligas, ke oni aŭdas supersonorajn vibradojn. Ili trovis, ke dum libera flugado la vesperito eligas ĉirkaŭ 30 kriojn ĉiusekunde, sed se estas antaŭ ili ia objekto, ili duobligas la nombron da krioj. La doktoroj per tuko ligfermis la buŝon de kelkaj vesperitoj kaj poste flugigis ilin. Sed la kompatindaj bestoj tute ne sciis kien flugi, ili nur ŝvebis en la aero. Kiam oni ŝtopis la orelojn de la vesperitoj estis same danĝere por la bestoj, ĉar ili koliziis kun ĉirkaŭaj objektoj.

La vesperito, do, uzas tiun saman principon je kiu la radar-aparato estas bazita. Vere, mirindaĵo! Oni faris ja tian bruegon

pri la eltrovo de la „radar“-aparato. Kaj tamen la vesperto, tiu malamata sed utila besto, kiun ni foje vidas rapidege flugeti en la mallumo de la nokto, jam ekde la kreo de la universo kunportis en sia kapeto „RADAR“-aparaton!

Laŭ „Steleto Rosaria“ (El Amerika Esperantisto).

RICEVITAJ ESPERANTAJOJ.

Jarlibro de IEL, 1946, dua parto. Liverita nur al individuaj membroj de IEL.

„**La Vivo**“, nova revuo, kies subtitolo estas: „Gazeto por ideologia konstruo kaj internacia edukado“. Ĝi estas la monata organo de „Amikoj de la Homaranismo“. Redaktoriño estas s-ino E. v. Veenendaal-Bouwes, la administradon prizorgas Siem de Geus, Zevenhuizerlaan Heilo, Nederlando, ĝironumero 41183. Jarabono kostas f 2,50. — La gazeto enhavas interesajn artikolojn pri mondpolitiko, mondekonomio, psikologio, „La Homo kaj la Vivo“, Generalaj sciigoj, ktp. — Mallonge, tre interesa revuo. Oni petu specimenon de s-ino v. Veeendaal, Kapelweg, Limmen, Nederlando.

Internacia Kulturo, la progresema, demokrata revuo de balkanlandaj Esperanto-Asocioj, komencis sian duan jaron. La nova jaro ampleksos la periodon de septembro '46 — januaro '47, do 16 numerojn. — La enhavo de la grandformata, 16-paĝa, ilustrita revuo estas bonstila kaj tre interesa (beltristiko, poezio, kulturaj informoj, sciigoj pri la Esperanto-movado, ktp). La revuo estas abonebla ĉe TJO-Centro. Abonkotizo por 16 numeroj 6. guld. — Tiuj, kiuj deziras daŭrigi sian abonon bonvolu kiom eble plej baldaŭ pagi sian kotizon por la nova jaro.

Instruistoj! Atentu!


La franca progresema eduk-movado „Presarto en lernejo“ havas Korespond-Servon kiu celas praktikigi Esperanton al infanoj, eĉ se ili ankoraŭ ne konas la lingvon. Ĝi planis simplan metodon kiu postulas malmulte da peno. El via kunlaboro povos rezulti multe por nia lingvo. Nepre petu informojn de Lentaigne, Balaruc-les-Bains (Hérault) Francujo.

Bonvolu aperigi en via enlanda Esperanto-gazetaro. — Dankon!

Esperanto en la lernejo kaj nia internacia kunveno.

Dank' al la laboro de kelkaj instruistoj, kaj precipe pro la propagando pere de niaj filmoj pri la internaciaj TJO-kunvenoj en Groet kaj Tervuren, Esperanto momente estas instruata en multaj nederlandaj lernejoj, i.a. en: Purmerend, Edam, Oosthuizen, Groet, Heerhugowaard, Uitgeest, Castricum, Haarlem, Blijham, Wildervank, N. Njedorp, Kommerzijl, Veendam, Enschede, Winschoten, Roden, Bilthoven, Alkmaar. En multaj lernejoj oni entuziasme studas, por partopreni en la internacia kunveno en Ipswich. Ni do atendas, ke granda grupo da nederlandanoj iros al Britujo! Pro tio ni konsilas tiujn, kiuj deziras partopreni: anoncu vin kiom eble plej baldaŭ! Bedaŭrinde ni ankoraŭ ne ricevis detalajn sciigojn el Britujo.

PRINCO PABLO.



El la ĝardeno ne plu venas bruo: Mimi kaj Jipi forpelis la katoN de la najbaro.

Luiza iras al la bufedo; ŝi prenas tasojn kaj iras al la malgranda tablo en la angulo. Ŝi uzas la kakaujoN kaj la sukerujoN kaj kuiras kakaoN sur la kuir-aparato.

Felipo revenas de la kino. Patrino kaj la kvar infanoj ricevas la regaloN de la sabat-vespero. Ili trinkas kakaoN, manĝas biskvitojn kaj babilas.

„Ĉu Pio iris kun vi al kino, Felipe?” demandas Patrino.

„Jes Panjo! Pio diras, ke lia patro volas, ke li denove iru al la lernejo.”

„Kial lia patro volas tion? Li iris kun vi dum kelkaj jaroj al la sama lernejo.”

„Jes! sed lia patro diras, ke li ne lernis multe, ĉar pastro Lorenzo estis malsana kaj fraŭlino Plumnova estas tre maljuna.”

Patrino ne respondas; ŝi pensas. Pastro Lorenza estis malsana; li ankoraŭ estas malsana. Kaj la tre maljuna fraŭlino ne instruis bone. Felipe ankaŭ ne lernis multe: li kalkulas malbone, li legas malfacile, li skribas tre malbele kaj li faras erarojn. Patrino ekĝermas.

„Pablo kaj Anita! estas tempo!”

„Jes Panjo!”

La infanoj obeas; ili kisas ŝin kaj foriras. Luiza iras kun ili. Post kelkaj momentoj ŝi revenas.

„Princo Pablo jam dormas,” ŝi diras.

denov-e	li ir-u	mal-san-a	la regal-o
ŝi ekĝerm-as	la jar-o	mult-e	ili ricev-as
la erar-o	li kalkul-as	mult-a(j)	sam-a
facil-a	kial	ili obe-as	san-a
facil-e	ili kis-as	pastr-o	li skrib-as
li far-as	li leg-as	ŝi pens-as	la temp-o
ili forpel-is	la lern-ej-o	plu	ŝi uz-as
la fraŭl-o	mal-facil-a	la plum-o	li vol-as
la fraŭl-in-o	mal-facil-e	ŝi pren-as	


Ekzerco. Analizu: Mi trinkas kakaoN. MiN mordis la kato. La birdojN forpelis la hundo. La viro batis viN. Mi ricevis bananojN. Vi vidis miN. Mi vidis viN. Ili manĝas biskvitojN. Li volas tioN. Felipo faras erarojN. Ili kisas ŝiN. La knabo lernas la lecionojN.

Ekzerco. Enmetu N tie kie estas necese: La knaboj. . batas la hundo... La hundo. . mordas la knaboj... Pablo. . tuŝis la vesperto... Ni. . trinkas akvo... La knabino. . manĝis panon... Kial vi. . faris tio...? La kammuso. . manĝis la kato... La pastro. . instruis vi... Bananoj. . mi. . manĝis

Gramatika enhavo: analizi; la rekta komplimento: N; N post substantivo plur. kaj post tio kaj ŝi; la korelativo: kial; ripetado: is; e.

Leciono 22.

LA BELA FILMO.



„Ĉu estis bela filmo, Felipo?” demandas Patrino.

„Ho jes! Panjo. Estis filmo kun Tomo Miks”.

„Kaj kioN vi vidis, Felipo?”

„Tomo Miks rajdis sur monto kaj li vidis, ke malbonaj viroj rajdas al la V-bieno; ili ŝtelis ĉevalojN kaj forrajdis kun la ĉevaloj. Tomo Miks rajdis malantaŭ ili kaj li vidis, ke la friponoj iras al la Z-bieno; Tomo rajdis returne al la V-bieno; li avertis la posedan-

toN kaj aŭdis, ke la friponoj kunprenis la belaN filinoN de la posedanto. Ŝi estas bela knabino, Panjo!”

„Mi ne dubas pri tio, Felipo,” ridas Patrino.

„..... kaj Tomo rajdis rapide, tre rapide al la Z-bieno. La friponoj kaŝis la belaN knabinoN en la stalo, sed li trovis ŝiN. Ili forkuris kaj ili serĉis la ĉevalojN. Nun ŝi helpis liN. Ili trovis la ĉevalojN kaj tranĉis la ŝnurojN. Ili forrajdis kun la ĉevaloj, sed nun la friponoj vidis iliN kaj persekutis iliN. Ili rajdis rapide, tre rapide; Tomo Miks pafis kaj kelkaj friponoj falis el la seloj. Kaj la friponoj pafis, sed ili trafis nek liN nek ŝiN. Kaj ili rajdis, rajdis tre rapide kaj Tomo Miks perdis la grandaN ĉapeloN. Kaj nun unu fripono trafis la ĉevaloN de la bela knabino. Ŝi falis el la selo, sed Tomo saltis de la ĉevalo. Li portis ŝiN al kabano kaj defendis ŝiN. Li pafis tra la fenestroj kaj nun kuglo trafis liN en la ŝultro. Sed nun venis helpo: la patro de la bela knabino kaj liaj bovistoj alvenis kaj ili forpelis la friponojN.”

„Kaj la patro kaj Tomo Miks kaj la bela knabino estis feliĉaj, ĉu ne, Felipo?”

„Jes Panjo!”

li avert-is	ili fal-is	ili kaŝ-is	li port-is
la bien-o	feliĉ-a(j)	kugl-o	la posedant-o
la bov-o	film-o	ili kun-pren-is	la sel-o
bovist-o	ili for-kur-is	mal-feliĉ-a	ili serĉ-is
la ĉapel-o	ili for-rajd-is	nek...nek	ili traf-is
la ĉeval-o	fripon-o	li paf-is	li trov-is
li defend-is	la help-o	li perd-is	
mi dub-as	kaban-o	ili persekut-is	

Ekzerco. Analizu: La kuglo trafis liN. Ili trovis la ĉevalojn. ŜiN li portis. La ĉapeloN li perdis. Li vidis iliN. La ŝnurojN li tranĉis. KioN vi vidis? KioN ŝi skribis? KioN ni legis? KioN ili aŭdis?

Ekzerco. Skribu ĉiujn vortojn kun $\hat{}$, kiujn vi lernis.

Gramatika enhavo: la rekta komplemento: N; N post adjektivo sing. kaj post la personaj pronomoj: li — ili; nek...nek; ripetado: is; e.

LUDO (ludi komedion).

La gvidanto rakontas aŭ laŭtlegas iun historion. Tiam li dividas la „rólojn”. Oni tuj komencas la unuan prezentadon. Do sen lernado aŭ ripetado. La ne-rolantoj estas la publiko. Ĉiu ludu nature, per la helpo de sia fantazio, sed ĉiu devas sekvi la historieton. La publiko aplaŭdas, alportas florojn, ktp. La ludo estas bonega metodo por paroligi komencantojn. Sed — oni nur havos sukceson, se ĉiuj kune ludas!

Por komencantoj.

Feraĵoj por vendi.

„Ĉu vi havas feraĵojn por vendi, sinjorino?”

„Ne hodiaŭ, sed revenu post kelkaj semajnoj. Mia edzo ĵus aĉetis aŭtomobilon.”

El „Svisa Espero”.

La heliko.

Heliko loĝis ĉe fervoja digo. Ĉiutage tie preteriris rapidvagonaroj. Ili multe ĝenis la helikon.

„Mi malhelpos tion!” diris la heliko al si mem, kaj ĝi ekstaris inter la reloj. Kiam alvenis trajno ĝi minace etendis la palpilojn. „Mi puŝos ĝin teren!” diris la besteto. Ĝi estis kuraĝa pro kolero. La rapidvagonaro preterveturis super la heliko. La besto turnis sin, kaj rigardis post la trajno. „Ĝi ne povas kontraŭstari!” ĝi diris malestime. „Ĝi forkuras, tiu malkuraĝulo!”

Laŭ „Aŭstria Esp.-Revuo”.

Respondu al jenaj demandoj: Kie loĝis la heliko? Kio tie preteriris? Ĉu la heliko ŝatis tion? Kial la heliko ne ŝatis tion? Kion ĝi faris? Kie la heliko ekstaris? Kion ĝi pensis? Ĉu la heliko haltigis la trajnon? Ĉu la trajno reiris?

En la lernejo.

La instruisto ĵus klarigis la frakciojn. Li diras al unu el la knaboj: „Joĉjo, se vi havus unu pomon, kaj se venus al vi tri amikoj, kion vi farus tiam?”

Joĉjo: „Tiam mi metus la pomon en mian poŝon, kaj mi formangus ĝin poste!”

Laŭ „Heroldo”.

La fiŝosto.

Dum festmanĝo oni parolas pri esperanto.

Jansen estas tre fervora esperantisto. Li asertas, ke oni en Esperanto povas pli facile esprimi sin, ol en aliaj lingvoj. Subite li komencas eligi strangajn sonojn. Liaj tablo-kunuloj tre mire rigardas lin.

Kiam s-ro Jansen ree silentas, unu el la sinjoroj diras: „Ĉu tio estis Esperanto?”

„Ne,” spiregas la esperantisto, „fiŝosto!”

Li kriis tro laŭte!

Dentisto eltiris denton de farmisto. La farmisto kriaĉis terure. Post la traktado la dentisto postulis 10 guldenojn. La farmisto protestis, ĉar la prezo estis nur 2,50 guld.

Sed la dentisto respondis: „Ĉar vi tiom kriaĉis, forkuris tri aliaj pacientoj. Kaj kompreneble vi devas pagi tion!”

Respondu al jenaj demandoj: Kiu eltiris denton? Kies denton li eltiris? Ĉu tio doloris? Kion faris la farmisto? Kiom da mono postulis la dentisto? Ĉu la farmisto konsentis en tio? Kial li protestis? Kial la dentisto postulis tiom multe?

Elreviĝo.

La etulo ĵus vekigis, kaj li tre ploras. La patrino demandas al li: „Kial vi tiom ploras, karuleto?”

„Mi songis, ke la onklino alportis al mi grandan skatolon da kuketoj, kaj mi vekigis antaŭ ol mi povis malfermi ĝin!”

El „Svisa Espero”.

Kun la Esperanto-klubo al Volendam.

Ni foriris matene je la oka horo per boato de West-Graafthijk al Volendam. La vetero ne estis bela, sed tio ne estis grava. Ni kantis la tutan vojaĝon el la kantaro „La Juna Vivo”. Kiam ni alvenis en Volendam estis la dekdua horo kaj ni manĝis. Kiam ni estis pretaj, ni iris promeni. Ni vidis virinojn kun puntaj ĉapoj kaj vastaj jupoj. Ni ankaŭ vidis dometon interne. Tie virino multe rakontis al ni pri ĉio. Poste ni promenis preter la haveno. Tie kuŝis multaj fiŝkaptistaj ŝipoj. Ankaŭ staris tie viroj kun vastaj pantalonoj. Sur la piedoj ili havis lignoŝuojn. La infanoj havas la samajn vestojn, kiel la grandaj homoj. Tio estis interesa. Tiam estis jam la kvara horo, kaj ni iris hejmen. Ni tien alvenis je la sepa horo. Estis agrabla tago!

West-Graafthijk.

Riet Bankersen (11-jara).

En No. 8-9 de „La Juna Vivo” de la jaro 1941a, aperis artikoleto pri Niĉjo Minnaja, tiam la plej juna itala Esperantisto. Niĉjo nun estas 8-jara, kaj perfekta Esperantisto. Depost kiam li estas TJO-ano, li deziras verki por „La Juna Vivo”. La suban fabelon li tradukis speciale por ni.

HISTORIO DE SUNFLORO KAJ DU HELIKOJ.

(fablo de Pierina Boranga).

En ĝardeno loĝis du helikoj. Iun malsekan kaj nebulan matenon ili jam frue vojaĝis tra la ĝardeno.

„Hodiaŭ estas bela tago, mia amiko! Ĉu vi deziras fari belan vojaĝon?”

„Ĉu mi? Jes! Sed kial vi demandas tion?”

„Se vi volas sekvi min, mi kondukos vin al reĝa manĝo!”

La alia heliko, kiu estis tre frandema, mallevis la palpilojn por rigardi per siaj brilaj okuletoj al la amiko, por vidi, ĉu ĝi parolas serioze.

„Jes, vere reĝa manĝo! Sed oni bezonas kuraĝon! Ĉu vi vidas tiun altan, grandan sunfloron? Rigardu, kiom bela ĝi estas, plena de brilaj gutoj! Pensu, ke ĉiu floreto estas sukoplenta, kaj dolĉa. Devas esti plezuro manĝi tie alte! Ĉu vi ne kredas?”

„Ho jes, sed ŝajnas al mi, ke tiu granda floro ne estas por ni. ... De kiam ekzistas la mondo, ni helikoj ne povas veni al sunfloro! Nur kiam la floro kuŝas sur la tero, sen folioj, sed plena de semeroj, kiel ŝtonaro.”

„Viaj pretekstoj ne valoras centimon! Vi timas!”

„Ĉu mi timas? Vi eraras! Aŭskultu! Oni diris al mi, ke por veni al sunfloro, oni devas pasi tuj sub la floro lokon plenan de pikiloj. Ili trapikas nian karnon kiel hokoj. Tiuj pikiloj estas la gardistoj de la sunfloro. Aŭskultu, amiko, ĉu ni scias, aŭ ne, ke tiuj floroj ne estas por ni? Kaj se ni alvenus supre, ĉu ni ne sentus nin kiel ŝtelistoj?”

La alia heliko ĉe tiuj vortoj ŝvelis pro malestimo. Ĝi eligis ĉiujn kvar palpilojn, kaj plilongigis ilin kiom eble plej multe kontraŭ la amiko. Ĉi tiu komprenis, kaj, ĉar ĝi ne volis montri timon, ĝi rapide diris: „Ne, ne, nenio! Ankaŭ mi komprenas, ke tiel pensis niaj prapatroj. Nun la tempoj estas aliaj. Vidu, mi estas preta por sekvi vin!”

„Do, ni iru!” La unua heliko iris antaŭe, kaj la alia sekvis. Komence ĉio iris bone, ĉar la trunko estis glata kaj ankoraŭ mal-

seka pro la pluvo. Sed poste la helikoj komencis renkonti harojn, multajn kaj densajn, malglatajn kaj tiklajn.

„Ne tiklu min,” diris la dua heliko al haro, kiu atingis ĝian buŝon. „Ĉu ŝajnas al vi, ke mi estas papilio, kiu deziras ŝerci?”

„Ĉu vi papilio?” kaj ŝajnis, ke ĉiu haro deziris ridi. „Vi ne similas papilion. Rigardu, kiel vi nin lasas! Vi tute premeĝas nin kaj vi sufokas nin per via gluaĉo!”

„Ne plendu! Kiam venos la luno, vi vidos, kiom bela estas via trunko. Tiam vi nin dankos!”

Al la unua heliko ne plaĉis tiuj babiladoj. Ĝi haltis kaj turnis la kapon malantaŭen kun la palpiloj bone videblaj. „Finu kaj venu antaŭen kiel eble plej rapide!”

„Ĉu rapide? Kiel mi povas rapidi se tiuj impertinentaj haroj min tiklas?”

„Puŝu eksteren kiom eble plej da salivaĵo kaj sufoku ilin; sed ne decas interparoli kun la servistoj de la planto.”

Je la tagmezo ili estis preter la mezo de la trunko. La kompatinda, timema heliko estis mortlaca. Ĝia konko pezis kiel plumbo. „Nu,” ĝis diris al si mem,” se ni sukcesos reveni sur la teron, mi ĵuras je mia domo, ke mi neniam ree sekvos konsilon de alia.

La pli juna ne volis cedi. Ĝi atendis la kamaradon ĉe la fama loko de la gardistoj, kiu estis la kaliko de la floro. Ĝi ĵetis sin kuraĝe sur skvamon de la kaliko, sed ĝi restis tie kvazaŭ alnajlita. Ĝi provis siĝn fortiri, sed vane. Tamen ĝia obstineco estis pli forta ol la sufero. Per forta skuo ĝi sukcesis fortiri duonon de sia korpo, sed sur la hokoj restis pecoj de la haŭto, ĝuste de tiu malplej mola, kala, kiu servis al ĝi kiel piedoj. „Amiko, la venko estas proksima!” ĝi kriis.

„Verdire,” malice flustris la alia, „mi vidas ion alian.....”

La unua heliko, kiu alvenis sub la floron, ne plu povis rezisti: ĝia dometo balanciĝis ĉe ĉiu skuo. Ĝi komprenis, ke estos neeble iri eĉ unu centimetron plu. Ĝia korpo estis unu dolora vundo.

„Amiko”, time kuraĝis diri la dua, „Estas pli bone reiri malantaŭen”.

Daŭrigota.

Afable peto! Vi multe helpas nin, se vi pagas vian kotizon (abonmonon) por 1947 antaŭ la unua de januaro '47.

Atentu! Ĉar ni timas, ke la balotiloj el la malproksimaj landoj ne envenos sufiĉe frue, ni prokrastis la referendumon ĝis 1 februaro. Geamikoj, ne forgesu pleniĝi la balotilon kaj informilon. Aktive partoprenu en nia movado!!

Zamenhof-tago — Libro-tago. Je la 15-a de decembro ĉiu Esperantisto aĉetu almenaŭ unu libron!

ĜENERALAJ SCIIGOJ.

Pri la IEL-Kongreso en Bern oni petas nin sciigi: Por veturi al Svislando oni bezonas pasport-vizon. — Nur aliĝiloj kun samtempa pago validas. Ankaŭ mendiloj por restado kaj ekskursoj validas nur kun samtempa pago. — Oni planis belegajn ekskursojn en la ĉirkaŭaĵo de Bern, i.a. al Schwarzsee, tra la Berna Oberland, ktp. Oni petu informojn kaj mendilojn de la L.K.K.-sekretario, Bundesgasse 20, Bern, Svislando.

Bellamy kaj Esperanto. La jam dum pluraj jaroj ekzistanta Internacia Unuiĝo Bellamy (I.V.B.), kies sidejo estas en Nederlando, por siaj internaciaj rilatoj nun enkondukis Esperanton, kaj starigis la „Internacia Asocio Bellamy” (I.A.B.). Kiu deziras informojn pri la Bellamy-ekonomio turnu sin al: Internacia Asocio Bellamy, ac. v. Wijngaarden, Torenstr. 26, Beverwijk, Nederlando.

Studentoj, atent! Dum la kongreso de la „Internacia Federacio Studenta” en Praha s-ro Rosenstein (ne-esperantisto!), la gvidanto de la bulgara delegitaro, proponis Esperanton. La propono kaŭzis viglan diskuton, en kiu partoprenis reprezentantoj de multaj landoj. Ĉifoje la kongreso ne akceptis la proponon, ĉar ĝi venis tro subite. — La studenta sekcio de Kroata Esperanto-Ligo (KEL) serĉas kontakton kun kiom eble plej da studentoj, kaj organizaĵoj, por komune agi tiucele. Ĝi forte instigas skribi al la Plenuma Komitato de la Konsilantaro de Intern. Fed. Studenta, kies daŭra sidloko estas Praha II, Opletova 38, Ĉeĥoslovakujo, por rekomendi la lernadon de Esperanto kaj postuli ke la Plenuma Komitato prezentu al la venonta kongreso proponon, ke Esperanto estu akceptata kiel oficiala kongresa lingvo. — La petskribo estu ankaŭ en nacia lingvo.

Esperanto en la nederlanda radio. La „Nederlanda Kristana Radio-Asocio” elsendos ĉiun duan monaton kvaronhoran Esperantoprogramon per la radiostacio Hilversum. La dua elsendo okazos la 20-an de dec., de 19.45—20.00 (nederl. tempo).

TJO en la radio: La 14-an de januaro, 19.15 (ned. tempo) la radiostacio Hilversum elsendos kvaronhoran programon de la Nederlanda Komitato „Internacia Junularkontakto”. En tiu programo la partoprenantaj junularorganizaĵoj (i.a. TJO) intencas doni impreson pri siaj venontjaraj internaciaj kongresoj.

Esperanto en la hungara parlamento. El la proksimume 80 parlamentaj oficistoj 9 jam parolas esperanton. — Parlamentano ricevis ŝtatan subtenon por vojaĝi al nederlanda Esperanto-kongreso. — Parlamentano St. Csurgai faris interpelacion en la hungara parlamento al la ministro por edukado pri la enkonduko de Esperanto en la lernejon. La interpelacio trovis ĝeneralan aprobon de ĉiuj flankoj de la parlamento.

La hungara radio: Malgraŭ ĉiuj klopodoj oni ĝis nun ne sukcesis enkonduki Esperanton. La direktoro de la hungara radio asertas, ke oni en la okcidentaj landoj ne povas aŭdi la hungarajn disaŭdigojn. Pro tio oni petas la okcidentajn samideanojn skribi pri la bona aŭskultebleco. Oni skribu al Hungara Esperantista Societo Laborista, Budapeŝt, Fiumeistr. 4, aŭ rekte al Hungara Radio, Budapeŝt VIII, Sándorstr. 7.

Esperanto en Radio Wien. Depost la 20.7.1946 Radio Wien ĉiusabate dissendas je la 6.30-a—6.40-a h. matene (5.30—5.40 MET) Esperanto-kurson, gvidatan de kortega konsilanto Hugo Steiner.

De 6.40—6.45 matene (5.40—5.45 MET) sekvas Esperanto-raportoj de la Esperanto-Servo de Aŭstria Esperantista Federacio. Ondolongoj: 506.8 m, 25.41 m. kaj 48 m.

La eksterlandaj esperantistoj estas petataj raporti, ĉu ili bone povas aŭdi ĉi tiun dissendon al AEF, Wien I, Neutorgasse 9.

Esperanto en la praktiko. Por pruvi, ke Esperanto estas tre valora kaj utila en la praktiko ankaŭ kiam temas pri la gazetaro, ni starigis danan-esperantan gazetaran oficejon. Ni serĉas artikolojn de ĉiuj landoj, aktualajn raportojn, priskribojn, biografiojn de konataj homoj, tradukitajn aŭ originalajn literaturaĵojn. Ni prizorgas la tradukon el Esperanto kaj sendas la manuskriptojn — laŭ speco — al ĉiutagaj gazetoj, fakaj ĵurnaloj aŭ semajnaj revuoj. Ni ankaŭ bezonas fotografajojn el ĉiu mondparto.

Esperantistoj, kiuj iel povas helpi, petu adresojn de Redaktoro Rch. G. Nielsen, Herlufmagle, Sjaelland, Danujo.

KORESPONDADRESOJ.

Ĉiu TJO-ano aŭ abonanto unufoje jare rajtas enpresigi senpagan korespondadreson (2-linian).

Aŭstrio: Ni serĉas gekorespondantojn en ĉiu aĝo por niaj kursanoj. Skribu multnombro al: „Verda Stelo”, Werndl-gasse 12, Steyr.

Cehoslovakujo: Miroslav Veverka, 19-jara studento, Cerhenice u Kolina, dez. kor. kun ĉiuj landoj. Ev. interŝ. pm. Resp. certa.

Finnlando: 35 geknaboj (10-12-j.) el la unua klaso de la liceo, Yhteiskoulu, Somero, dez. kor. kun samnivelaĵ geknaboj. Komence kolektive, poste individue. La gvidanto estas la rektoro de la liceo, s-ro Joel Vilkki.

Nederlando: S-ro Geurts, Lernejestro en Edam, serĉas korespondantojn por siaj lernantoj.

18 geknaboj (10-13-j.) deziras korespondi. Adreso: S-ro H. A. Appel, Z.O. Singel 5, Bergen op Zoom.

F-ino M. Snijders, „Avondzon”, Purmerend, deziras korespondi kun ĉiuj landoj, i.a. pri muziko.

Georgy kaj Tatiana Staritsky dez. kor. kun gejunuloj 16-17-j. per il. pk. (prefere kun slavaj k.ekstereŭropaj landoj). Adr: Leidschevaart 554, Haarlem.

Polujo: Lernantoj de la Liceo de Belaj Artoj en Gdynia, dez. kor. kun ĉiuj, kiuj havas intereson pri belaj artoj, kaj dez. interŝ. desegnaĵojn, fotojn, ktp. Adr: Gdynia, Korzeniowskiego 43, Miejskie Liceum Sztuk Plastycznych.

Sovetio: Gruŝĉinskij Vadim, Nikolaev, Plechanovstr. No. 36, Ukraino, deziras korespondi.

Svedujo: (Korekto) Ruben Enocson, c/o Rönström, Valhallavägen 157¹¹, Stockholm, 22-jara aertrafika oficisto, dez. kor. kun gamikoj.

PERANTOJ.	TJO	LJV
Aŭstrujo: Johann Leopold Germela, Thongasse 5/3/12, Wien III/40.		
Belujo: C. Braet, Esscheboomstr. 1, Brugge, ĝiro 4770.86	40 fr.	24 fr.
Britujo: F.ino Rees, „Derwydd”, Seven Sisters, Neath, Glam. Wales	5 ŝil.	§ 3
Ĉeĥoslovakujo: Jaromír Jermár, Karlovy Vary, c/o Kotva Trída marŝála Koneva 1.	50 kĉs	30 kĉs
Finnlando: Allan Mehtonen, Oulu, Isokatu 67	125 fmk.	75 fmk
Francujo: S.ino Turin, Instruistino, Trépot, Doubs. Ĝironumero 287.02, Dijon.	100 fr.	70 fr.
Hispanujo: Octavio de Diego la Rosa, Baltazar Gracián 12-3º, Zaragoza	12 pes.	7 pes.
Italujo: Prof. Camuffo Armando, v. Bartolomeo, d'Alviano 4 IV, Trieste	215 L	130 L
Portugalujo: A. P. da Silva, Quinta do Ferro, Rua B. No. 28—20 Dto, Lisbono	25 esk.	15 esk.
Skotlando: S-ro A. Gordon, 28 Holehouse Rd. Kilmarnock	5 ŝ	3 ŝ
Svedujo: K. E. Karlsson, Upplandsgatan 691, Stockholm, ĝironumero 252674	4 kr.	2½ kr.
Svisujo: Eugen Klee, Brasselmühle, Rheineck	4 fr.	2½ fr.

SKRIBA ESPERANTO-KURSO.

POR HOLANDANOJ

Prezo por 16 lecionoj, lernolibro kaj senpaga korektado: f 4.—.
Mendu ĉe TJO-Centro.

<p>Internacia Lernolibreto „La Juna Vivo”</p> <p>La plej taŭga, kaj multe uzata lernilo. Prezo 0,50 guld. Ĉe la nova eldono, kiu aperos en decembro, estos apartaj vortlistoj, esp.-ned. Pro tio la libreto do tre taŭgas por uzi en la nederlandaj lernejoj. La prezo de la listoj estos 0,15 guld.</p> <p>Mendu ĉe TJO-Centro.</p>	<p>Propagandu per la TJO-Poŝt-papero! Prezo: 50 kovertoj kaj 50 leterfolioj: 2.— guld.</p> <hr/> <p>Ĉu vi jam posedas la Internacian kantaroon „La Juna Vivo”? Se ne, TJO-Centro ankoraŭ povas liveri ĝin! Prezo 0,50 guld.</p>
<p>Kursgvidantoj! Ne timigu viajn lernantojn per multekostaj kaj ofte tro malfacilaj lego-libroj! Uzu la binditajn jarkolektojn de „La Juna Vivo”! Ili enhavas abundon da legaĵo por komencantoj kaj progresintoj, ludojn, kantojn, ktp! Prezo f 1,— aŭ egalvaloro.</p>	